



NOVA SKIZO

FRONTARTIKOLO

Karaj normandaj kaj foraj samideanoj,
Pasintjare malfondiĝis la normanda esperantista asocio,
kiu eldonis ĝis nun 289 Normandajn Esperanto-Bultenojn.

Nia revueto ja estas grava kaj altvalora heredaĵo,
kiun aparte Petro, Ivo siatempe, Dominique kaj Michèle atente prizorgis!

Tial, Hérouville-Espéranto decidis daŭrigi ĝin por ke ĉiuj,
kiuj loĝas for de ni, en Normandio, aliloke kaj eĉ eksterlande
tamen sciu pri niaj agadoj kaj povu partopreni
kiel eble plej ofte en niaj aranĝoj almenaŭ enpense.

La ligo inter ni tiom gravas!

Pro la preso- kaj sendokostoj, nur tiu ĉi numero estos diponigita al ĉiuj surpapere:
ni decidis sendi de nun nian bultenon retpoŝte.

Vi devos legi ĝin surekrane aŭ printi ĝin mem.

Tamen sciigu al ni se tiu dissendmaniero ne taŭgas por vi.
Aliflanke, bona novaĵo: nia bulteno fariĝas de nun senpaga,
kolora kaj enriĉigita per alklakeblaj ligiloj.

Por ke via bulteno vivu plu, necesas, ke ĉiu verku kaj sendu
al la redaktistaro artikolojn en Esperanto aŭ en la franca.

Ĉiuj kontribuaĵoj estas bonvenaj, pri kio ajn ili temas.

Sen via helpo pereos nian heredaĵo.

Beafrano

Enhavo

Fontartikolo	1
Ni vizitis Ĉampanjon... kaj trinkis ĉampanon.....	2
Ni plantis ginkon.....	3
Poemo de Goethe.....	4
Prozaĵo de Bernard Clavel.....	4
Zamenhofa tago en Le Mans.....	5 & 6
Vizito de Claude Rouget el Norvegio.....	7 & 8
Nia ĉiujara ĉefkunveno.....	9
Novaj libroj en nia biblioteko.....	10
Movadaj noticoj	11
Baldaŭ en nia klubo	12
Aniĝu al la ununura normanda klubo	12





Raportas Kristiano kaj Joëlle el Bayeux

La 11-an kaj 12-an de oktobro 2024, kiel planite kadre de la programo de la festoj de la 40-a datreveno de la fondo de nia klubo, post longaj preparado kaj kunordigo, niaj paŝoj kondukis nin al Troyes...

Tre aktiva estas la tiea klubo, kiu akceptis nin sabaton. Ĝi estas gvidata de Michele Guingoin, kiun entuziasmigis tiu aranĝo. Ankaŭ aparte plezurigis nin la aliĝo de Paul kaj Nicole, el Reims.

La plej spertaj el ni ĝojis interŝanĝi en Esperanto, dum la komencantoj siaflanke trovis bona la okazon progresi. Estis tre interesa kaj varma renkontiĝo, kiu ebligis al ni interŝanĝi niajn spertojn, sed ankaŭ priparoli la malfacilecon vivigi niajn klubojn.

Ankaŭ estis okazo por malkovri aŭ revidi la urbon Troyes. Indas halti tie dum kelkaj horoj aŭ restadi dum kelkaj tagoj, ĉar la urbo estas belega kaj havas tre belan historian heredaĵon kaj belajn muzeojn. Ni prenis la tempon promeni en la malnova urbo kaj viziti la vitralo-muzeon.

Vizito de la Kooperativo Chassenay d'Arce en Ville-sur-Arce daŭrigis la tagon. Tie bonvenigis nin Sylvie kaj Florent. La du gekooperativanoj ĉiĉeronis nin dum bela kaj interesa vizito de la kooperativo (vidu artikolon pli sube), kompreneble sekvita de la nepra gustumado de ĉampano.

La tago finiĝis per komuna vespermanĝo en la feriloĝejo, kiun ni rezervis en apuda vilaĝo.

Ni pasigis belan, vivoplenan kaj riĉan semajnfino laŭ la tipa esperantista tradicio: amikeca kaj bonhumora.

Sabaton posttagmeze, ni vizitis la kooperativon Chassenay d'Arce. Ĝia 315-hektara vitejo situas en 14 komunumoj, en la koro de Côte des Bar, en la plej sudo de Ĉampanjo. Post projekcio de filmeto, Florent tre afable ĉiĉeronis nin kaj klarigis al ni la produktado-procezon de la mondfama vino.

Post kiam la vinberoj estis rikoltitaj permane, ili estas tuj premataj, vinbervario laŭ vinbervario kaj vinbergardeno laŭ vinbergardeno, kiel eble plej delikate por ke ili ne difektiĝu. La tiel akiritaj mostoj spertas, en grandegaj neoksideblaj kuvoj, fermentadon unue alkoholan, poste malolaktikan. La aldonoj gisto forkonsumas la sukerojn de la vinberosuko kiuj transformiĝas en alkoholon, karbonan dioksidon kaj aromojn kaj kompletigas ĝian aroman riĉecon. Nur ĉe la fino de la fermentado, la vinojn, apartigitaj ekde la komenco de la procezo, oni miksas. Tiel la vinistoj difinas la profilon de la dezirata ĉampano. Unu aŭ plurajn vinbervariojn, unu aŭ plurajn vinĝardenojn, klarajn vinoj el la sama jaro aŭ el malsamaj rikoltoj ili kombinas... Ĉi tiu alĥemio estas decidiga paŝo de la vinfarado-procezo de ĉampano, kiu donas al ĉiu vino sian propran tipecon. Tiam la vinojn oni enboteligas. La botelojn oni metas en mallumajn kelojn, kie ili maturiĝas dum almenaŭ 15 monatoj je temperaturo ĉirkaŭ 12°. Dum ĉi tiu tempo, estas necese turni ĉiun botelon tre regule kaj movi ĝin de horizontala al vertikala pozicio por malsuprenigi la deponaĵon en la kolon de la botelo. Ĝi estos poste forigita dum la elfluado.

Jen, la botelo ricevis sian definitivan korkon kaj estis vestita per sia plej bela etikedo. Venis tempo por ke ni frandeme gustumu la bonan vinon! Je via sano!



Raportas Bertrano el Giberville



foto: Bertrano

La 8-an de novembro, Skvaro Espéranto en Hérouville ni plantis ginkon okaze de la 40-a datreveno de la fondo de nia klubo.

3



**Raportas Bertrand
el Hérouville**



fotis Marie-Laure Thillays

Tiu ĉi arbo, simbolo de longviveco kaj paco, signas 40 jarojn da ekzisto de la asocio Hérouville-Espéranto. Okaze de sia 40-a datreveno la asocio Hérouville Espéranto volis planti arbon. Estis la lasta de la sekvo de eventoj, kiuj markis jaron plenan de aktivaĵoj: prelego en la biblioteko, trejnkurso, renkontiĝo kun aliaj esperantistaj kluboj, ktp...

Vendredon, la 8-an de novembro je la 17-a okazis plantado de ginko, meze de Skvaro Esperanto (Square de l'espéranto) inaŭgurita antaŭ 10 jaroj. Tiu ĉi skvaro situas en la kvartalo Grand Parc, inter la Domo de la asocioj (Maison des associations) kaj la Medicina poluso (Pôle médical).

Kial Ginko?

La elekto de ĉi tiu vario rezultas el diskutado inter la reprezentantoj de la komunumo kaj la esperantistoj. "Du-loba ginkgo povas vivi 3.000 jarojn. Estante la unua arbo, kiu rekreskis post la eksplodo de la atombombo en Hiroŝimo, ĝi fariĝis la simbolo de paco. Siaflanke, Esperanto ekde sia kreo fariĝis rimedo kaj agento por konstrui pacon", deklaris Bertrand Verstraete, prezidanto de la asocio, redirante la esperon de Ludoviko Lazaro Zamenhof, kreinto de Esperanto, ke homoj povu diskuti "en vivanta, neŭtrala, justa kaj egala lingvo."

Esperanto kaj kulturoj

Pluraj komunumaj elektitoj kaj reprezentantoj de la servoj de la urbo ĉeestis. Agnès Dolhem, vicurbestro komisiita pri kulturaj agoj kaj internaciaj rilatoj, rimarkigis la engaĝiĝon de Hérouville-Espéranto kaj "substrekas unu el ĝiaj celoj: kunlabori kun asocioj kaj grupoj, kiuj kundividis viajn valorojn, kontribuante al egaleco kaj solidareco." Tiujn vortojn subtenis Rodolphe Thomas, la urbestro, kiu rediris, ke "ĉar la loĝantaro de la urbo konsistas el preskaŭ 80 naciecoj, interkultureco tre gravas. Esperanto povas tie ludi sian rolon."

Muzika vespero

La okazaĵo pluis en la Domo de la asocioj, kie grupo de klarnetistoj atendis la publikon. Gviditaj de ilia instruisto, Guillaume Lefer, la dek konservatoriostudentoj aĝaj de 10 ĝis 17 jaroj ludis plurajn pecojn, inkluzive "Praia" de Alexis Ciesla kaj "Turnaround" de Michel Pelligrino. "Ili estas parto de grupo de 32 klarnetistoj, kiuj averaĝe de kvin jaroj praktikas", precizigas la instruisto. Invitita, Arthur Delaporte, deputito por Calvados, aliĝis al la kunveno.

Post amika trinkado okazis la tria parto de la vesperkunveno en la Kafejo de la Artoj (Café des arts) por vespermanĝo-koncerto. Armel Amiot kantis kanzonojn el siaj diskoj en la franca kaj en Esperanto, kaj prezentis Graeme Allwright.

Ginko duparta

Orienta bela arbo
nun en mia ĉi-ĝardeno,
jen mistera scio-farbo
sed nur post inico-veno

Ĉu nur unu sola aĵo,
kiu jen duobliĝas mem?
aŭ tamen ĉi-duoblaĵo
estas unu arba gem'?

Senutilis cerbum-kvanto,
kaj sekreto plue restas
ĉar ne diras mia kanto
ĉu unu aŭ du ĝi estas.

*Tradukis kaj donacis
kiel datrevena donaco
Renato Corsetti, 2024*

La plej malnova vegetala atestanto estas la ginko. Tiu, kiun ni ankaŭ nomas la kvardek-eskuda arbo. Laŭdire, ĝi aĝas ducent milionojn da jaroj. Kompreneble, ne temas pri la aĝo de subjekto, sed pri tiu de la specio, kiu neniam metamorfoziĝis, kiu rezistis al ĉiuj atakoj, kiu rifuzis ajnan evoluon. Proksime de Scarborough, Jorkŝiro, unu el ĝiaj folioj estis malkovrita fosiliĝinta en roko kiu aĝas ducent milionojn da jaroj. Tiu ĉi cifero igas min sonĝi. La ginko estas do la sola arbo, kiu alvenis al ni, dum aĝoj, de ĉi tiuj malproksimaj tempoj, sen ke io ajn povis defekti ĝin. Ĝia indiferenteco pri tio, kion ni nomas progreso ŝajnas al mi enhavi ion subliman. Tiu ĉi rezinarbo, la ununura tia, ŝajne estas ekipita por rezisti al ĉiuj specoj de poluado. Vi povas planti ĝin en la plej de aŭtoj trafikplenan avenueon, ĝi zorgas pri tio ne pli ol pri neĝo pasintjara. tamen ŝajnas, ke ĝi suferis, en certaj tempoj, pro ia kontaĝa malsano, ĉar fakuloj certigas, ke estis tempo, kiam ĝi estis trovebla en Eŭropo samkiel en Ameriko, en Afriko samkiel en Azio. Tamen sovaĝe, ĝi hodiaŭ kreskas nur sur kelkaj ĉinaj montoj. Imagu ĝian batalon. Eble jarcentoj de lukto simila al tiu, kiun kondukas niaj ulmoj. Imagu ĝian maloftiĝon. Ĝian malrapidan detruon kaj la supervivon de nur kelkaj individuoj, kiuj rifuĝis

sur tiujn altaĵojn de Ĝeĝjango. Sakrala arbo, de jarcentoj ĝi estas zorge kultivata en la ĝardenoj de certaj temploj en Japanio. Estis en Eŭropo, ke ĝi estis nomita la kvardek-eskuda arbo, pro la prezo kiun ĝi kostis, kiam oni komencis importadi ĝin. Ĝia folio, kiu iom elvokas palmopiedan piedon sen ungegoj, aŭtune koloriĝas je ekstreme brile flava koloro.

Stranga sorto estas tiu de tiu ĉi arbo, pri kiu ni ne scias, kio atakis ĝin tiel kruele antaŭ jarmiloj kaj kia miraklo igis ĝin pluivivis. Ĝia longviveco, ĝia preskaŭ totala malapero sekvita de rekonkero de la mondo helpe de la homo estas tre interesaj. Mi imagas kolportiston de ginko. Mi vidas lin forlasante Ĉinion kun sia skatolo plena de semoj, plena de vivo, plena de espero. Li trairus la vojojn, haltus tie kaj tie en tro kalvaj lokoj, en senpulmaj urboj, kaj li semus kvardek-eskudajn arbojn.

Li dissemus oron en la mondo. La plej belan oron, kiu ekzistas, la plej altvaloran, kiun oni povas malkovri, tiun, kiu renaskiĝas fine de ĉiu somero por lumigi la aŭtunon.

Foje, sub la herbo kurbigita de la pluvoj kaj ventoj, sub la neĝamasoj, kiuj protektas ilin kontraŭ frosto, restas kelkaj folioj, apenaŭ velkaj. Kaj la traserĉema printempo malkaŝas ilin per ventoblovo por montri al la nova suno la plej antikvan trezoron de la arbaro.

La 8-an de Decembro ni kunvenis en Le Mans por festi la 165-an datrevenon de la naskiĝtago de LL. Zamenhof.

5



Raportas François el Hérouville kaj Anne Marie el Flers.

Sekve de la invito de la mansa Esperanto-klubo (Groupe Espérantiste du Maine), por festi la Zamenhofan Tagon, 9 normandanoj el Hérouville kaj Flers veturis al Manso, dimanĉon la 8-an de decembro dum terura vetero.

Ĉeestis Maryvonne kaj Bruno Robineau, el la klubo Nanto, aŭtoroj de la libro *Ili vivis sur la Tero, ok jaroj da migrado ĉirkaŭ nia planedo* [1], kaj aliaj partoprenantoj de la kluboj de Nanto, Tours kaj Anĝero. Entute, ĉirkaŭ 40 esperantistoj aliĝis al la aranĝo.

La proponitaj agadoj estis diversaj kaj interesaj.

Post bonvenkafo, delegito de ĉiu klubo prezentis la diversajn agadojn de sia klubo.

Poste, la mansa klubo proponis tradukludon pri proverboj aŭ idiomaj esprimoj.


Ni poste aŭskultis tre interesan prelegon de Frank Mintz. En Esperanto, li prelegis pri "la artefarita lingvo Esperanto kaj la evoluo de kvar naturaj lingvoj (makedona, hebrea, eŭska, kaj valencia)". Dum tiu prelego, li reliefigis, ke la malsamecojn inter artefaritaj kaj naturaj lingvoj, oni devis nuanci. Tiun prelegon, vi povos legi en [la bultenoj 8, 9 kaj 10 de GEM](#).

Malsatigitaj de tiuj ĉi taskoj, ni ĝuis kune tre agrablan kaj bonan tagmanĝon provizitan de la klubo Le Mans.

La posttagmezo estis pli arta: la fama kantisto Armel Amiot el Cherbourg, amanto de la haveno Carteret, li diris, regalis nin per koncerto. Li kantis en Esperanto kelkajn el siaj propraj komponaĵoj kaj en la franca kanzonojn de Graeme Allright.

Ni malvolonte forlasis ĉi tiun esperantistan kunvenon kaj revenis al Normandio... ankoraŭ pluvegis.

[1] En nia biblioteko disponeblas la libro (BIO -. – ROB, 042)



Armel Amiot estas normanda kantisto, gitaristo kaj banĝo-muzikisto.

Jen ligilo al [lia persona retejo](#).

El la [retejo Vinilkosmo](#), vi povos elŝuti liajn diskojn "Banĝo-Esperanto" kaj "Dezertoj".

Armel vizitis nian klubon pasintjare kaj pasintan oktobron okaze de la plantado de nia ginko. (Legu paĝon 2).



Frank Mintz naskiĝis en Montpellier en 1951. Li estas fama franca historiisto, verkisto, tradukisto kaj esperantisto, aktivulo de la anarkosindikata movado, membro de la sindikato CNT-SO Confédération Nationale des Travail-leurs - Solidarité Ouvrière. Li estis intruisto pri la hispana.

Liaj verkoj ĉefe rilatas kun la historio de la anarko-sindikatismo kaj de la CNT dum la Hispana Socia Revolucio de 1936.

Por scii pli pri la vivo de la kreinto de Esperanto

EN NIA BIBLIOTEKO:

L'homme qui a défié Babel: Ludwik Lejzer Zamenhof (BIO -.- CEN - 031)

La homo, kiu defiis Babelon: Ludoviko Lazaro Zamenhof (BIO -.- CEN - 540)

verkita de René Centassi kaj Henri Masson.

Disponblas versioj en la franca kaj en Esperanto.

Vivo de Zamenhof (BIO -.- PRI - 038, 039)

biografio belstile verkita de Edmond Privat, en Esperanto

EN INTERRETO:

Biografio de la kreinto de Esperanto - Bildstrio


Yanpetro Kavlan

Alklaku la ligilon al la franca versio:

cutt.ly/Vie-de-LLZ-1 & cutt.ly/Vie-de-LLZ-2

Alklaku la ligilon al la esperanta versio:

bit.ly/Vivo-de-LLZ-1 & bit.ly/Vivo-de-LLZ-2



Lumiĝo

Poemo de Miguel Angel Gonzalez Alfonso *el la poemaro Fidela Amiko*

Revantoj dum jarcentoj serĉadis
solvon homan
por pacigi etoson akran
inter militoj kaj paco.

Jen historio pri la lingvo. – Kreintoj
ĉiuj sukcesi deziris;
tamen nur venkis
Lazaro kun sia komunikil' Esperanto.

Ne kontentigaj homoj
perforte Esperanton ŝanĝi ŝatis.
Senĉesaj kontraŭ Esperanto klopodoj fiaskis;
ĝi floriĝis kaj kun Lazaro dancis.

Ludovikaj larmoj kuradis,
sed miraklan frukton kreskadis,
neŭtrala lingvo ornamita per miloj
da esperanto – amant – parolantoj.

Lazaro ne mortis.
Li nur vojaĝis tereksteren
por kunigi aliajn pacdezirantojn,
li fariĝis, geniulo, pluvo, suno, kanto.

Lazaro ankoraŭ vivas.
Ĉe mia kor', li skribas.
Ĉe mia korp', vivas li.
Feliĉan naskiĝtagon, kara Lazaro!

Miguel Angel Gonzalez Alfonso estas esperantista poeto el Kubo.

Li kaj lia edzino Daimi Doval Delsa vizitos nin de la 7-a ĝis la 11-a de Majo 2025.

La 20-an de Decembro vizitis nin Claude Rouget el Norvegio

7

Okaze de ilia vizito, ni bonvenigis Aleksandra kaj Claude. Ili parolis pri sia vivo norde de la polusa cirklo kaj pri la esperantista norvega movado. Tiu-ĉi renkontiĝo, dum kiu ankaŭ alvokis nin telefone Ljuba, kompreneble finiĝis per kuna manĝo. Ni estas samlandanoj de Asteriks, ĉu ne?



fotis Bertrand

Raportas Claude
el Caen



Raportas Vivien
el Hérouville

Claude Rouget, franca esperantisto loĝanta en Norvegio, lastatempe vizitis la Esperanto-klubon de Hérouville. Li rakontis pri sia vivo en Norvegio, kie li loĝas kun sia edzino kaj filino. Lia filino lernis Esperanton frue post sia gepatra lingvo, la norvega. Dum la vizito, li klarigis interesajn faktojn pri Norvegio, inkluzive de la du oficialaj similaj lingvoj kaj la diversaj regionaj dialektoj. Li ankaŭ menciis kulturajn diferencojn en la labormondo, kie komunikado inter laboristoj kaj estraroj estas pli facila ol en Francio. La renkontiĝo finiĝis per komuna manĝo inter li kaj la klubanoj, kiu plifortigis la amikan etoson.

Claude Rouget, kiu naskiĝis en Francio, vivas de 30 jaroj en Tromsø apud la norda poluso. Tie li instruas la francan lingvon, historion aŭ matematikon.

Ni plurfoje renkontis lin, en 2019, li biciklis inter Norvegio kaj Portugalio, haltante en Eruvilo kaj en kelkaj aliaj esperanto-kluboj.

Li delonge esperantistiĝis, kaj dank' al Esperanto renkontis sian kunulinon Luba, de rusa deveno.

Li havas filinon, Alexandra, kiu denaske parolas Esperanton, la rusan, la francan kaj la norvegan. Nun ŝi lernas en Hispanio.

Fine de decembro, li denove vizitis nin, kaj la 20-an partoprenis nian kluban kunvenon. Li afable kaj klare respondis al nombraj demandoj pri sia vivo, aŭ diferencoj inter Norvegio kaj Francio...

Kompreneble ni manĝis kaj trinkis kune en agrabla etoso.

Tromsø estas la plej granda urbo de Norda Norvegio kun ĉirkaŭ 75 000 enloĝantoj.


Ĝi situas norde de la polusa cirklo, pro tio tie la suno ne subiras la horizonton dum du monatoj somere kaj ne suprenvenas dum du monatoj vintre.

Oni povas ofte bone observi la nordan lumon dum la malluma periodo.

Tromsø estas la centro de la regiono Troms. Ĉi tie oni trovas universitaton, teatron, kaj profesian orkestron. Ĉefaj vidindaĵoj estas, Tromsø muzeo, Polaria, Ishavs katedralo, Botanika ĝardeno. Oni povas facile ekskursi al la montaro aŭ al la marbordo.

En la urbo ofte okazas festivaloj, ekzemple internacia filmfestivalo kaj la Norda Lumo Festivalo en januaro, noktomez-suna maratono en junio, kaj diversaj rokmuzikaj festivaloj.

La loka esperantita klubo nomiĝas "La Norda Lumo".



El la retejo de la klubo "La Norda Lumo"



Intervjuo de Claude Rouget



Intervjuis Bertrano
el Giberville

— **Ne ĉiuj konas vin, Claude. Ĉu vi povus koncize prezenti vin kaj klarigi viajn rilatojn kun nia klubo ?**

— Mi devenas de Francio. Mi loĝas de preskaŭ 40 jaroj en la nordnorvegia urbo Tromsø.

Antaŭ ol mi translokiĝis en Norvegon, mi loĝis en Bayeux; Yves Nicolas estis bona amiko de mi.

Poste, mi revenis en Caen en 2011-12 ĉar mi volis, ke mia filino Aleksandra, kun kiu mi ĉiutage parolis la francan, havu pli bonan konon pri la franca kulturo. Kun mia rusa edzino Ljuba, ankaŭ esperantisto, ni decidis pasigi unu jaron en Caen kaj kompreneble havis kontakton kun la klubo.

— **Ĉu via filino, Aleksandra, parolas Esperanton denaske?**

— Verdire, iumaniere: hejme, ŝi ne parolis Esperanton kun ni. Ŝi parolis la rusan kun sia patrino, la francan kun mi kaj la norvegan kun siaj amikoj en la lernejo, sed, ĉar Ljuba kaj mi interparolis en Esperanto, Aleksandra aŭdis ĉiutage Esperanton. Tiel ŝi eklernis la lingvon, kiun ŝi nun bonege regas.

— **Vi mem, kiam, kial kaj kiel vi fariĝis esperantisto?**

— Mi fariĝis esperantisto komence de la 80-aj jaroj iom nekutime. Tiuepoke, mi tute ne interesiĝis pri Esperanto. Iun tagon, mi petveturis. Aŭtisto prenis min kaj... parolis pri Esperanto dum du horoj! Verdire, li tedis min. Mi sincere pensis, ke ne povus ekziti tia lingvo, facila, neŭtra, respekta al ĉiuj, kaj tiel plu. Tamen, scivolema, mi aĉetis iun broŝuron en Parizo... fakte nur kun la intenco trovi kial Esperantisto ne funkcias, kaj ne povus funkcii sed... mi ne trovis... ŝanĝis mian opinion kaj fariĝis esperantisto!

— **Kio aperis al vi stranga, kiam vi translokiĝis al Norvegio?**

— Tio, kio plej surprizis min, kiam mi alvenis al Norvegio, estis la pacienco de la aŭtistoj kiam mi biciklis. Neniu hupo aŭdiĝis kiel en Francio kaj mi pensis: "Kia popolo estas tiu, kiu permesas al mi bicikli sur la ŝoseo senprobleme?" Alia rememoro estas, ke ĉio estis bela en la universitato, estis neniu grafitio sur la muroj, la necesejo ne estis detruita kiel ofte okazas en Francio, kaj estis pura.

Tamen ne opiniu, ke ĉio estas perfekta en Norvegio kaj malperfekta en Francio. Estas bonaj kaj malbonaj flankoj en ambaŭ landoj.

— **Vi fariĝis norvego, vi ne plus estas franco...**

— Tio estas afero de difino. Mia pasporto estas norvega ne plu franca sed en mia kapo, mi ankoraŭ estas franco. Mia nacieco estas franca sed mia civitaneco estas nun norvega. Tio estas nur afero de papero.

— **Vi estas la redaktoro de la bulteno "Norvega Esperantisto". Kiel fartas la esperantista tiea movado?**

— La movado bedaŭrinde sufiĉe malbonfartas, kiel ĉie en Eŭropo mi pensas. Multaj maljunuloj aŭ mortis aŭ ne plus havas sanon por aktivi kaj ne estas multe da junuloj por anstataŭi ilin. Junuloj ne interesiĝas pri kluba vivo, eĉ mia filino Aleksandra, kiu tamen parolas plu Esperanton.

— **Mi dankas vin pro viaj respondoj kaj pro via vizito. Nome de nia klubo, mi rediras al vi, ke vi - aŭ iu ajn klubano de la Norda Lumo - ĉiam estos bonvena okaze de iu venonta vizito en Normandio.**

Quel bilan fais-tu de 2024 ?

L'année 2024 était celle de notre quarantième anniversaire. Pour le fêter et faire connaître notre association et l'espéranto, nous avons organisé de nombreux événements qui ont jalonné l'année. Nos cours hebdomadaires bien sûr mais aussi des stages d'initiation et de perfectionnement en mars, précédés d'une conférence de Renée Triolle, ancienne vice-présidente de l'Association Universelle d'Espéranto et déléguée à l'UNESCO. Neuf d'entre nous ont participé en mai au congrès européen qui s'est tenu à Strasbourg. Un gingko, arbre symbole de la Paix a été planté en novembre Square de l'Espéranto ; un numéro spécial de notre bulletin régional a retracé les grands événements de la vie de notre club, qui constituent son héritage.

Quelle évolution souhaites-tu impulser ?

En 2025, nous souhaitons organiser notre action autour de quatre axes :

- faire davantage connaître notre langue en accueillant de nouveaux participants dans nos cours, chaque mardi de 17 h. 30 à 19 h. 00, à la maison des associations,
- fédérer tous les espérantistes normands qui n'ont pas la chance de trouver à proximité de chez eux une association comme la nôtre,
- renforcer notre ancrage local et régional en impulsant ou en consolidant des synergies avec d'autres associations porteuses du même projet de développement culturel et interculturel et des mêmes valeurs de coopération et de solidarité internationale, sur la base d'une langue commune, neutre et équitable,
- développer des partenariats avec les autres associations espérantistes aux niveaux interrégional, national et international.

Trois questions à Bertrano.



Quels sont les projets de l'association pour 2025 ?

Ils sont trop nombreux pour être tous évoqués ici. Soulignons-en quelques-uns. Nos cours hebdomadaires sont bien évidemment la base de notre action. Ils nous faut donc assurer leur promotion en participant aux événements locaux : café polyglotte (mars) et fête des associations (septembre) sont des temps forts. Mais apprendre une langue n'a d'utilité que si elle permet de communiquer. Nous accueillerons à Hérouville deux espérantistes cubains en mai et quelques-uns d'entre nous participeront aux congrès national, à Nantes en juin et mondial, à Brno en juillet. Nous participerons à la Journée internationale de la Paix en septembre et à différentes manifestation culturelles à Hérouville et ailleurs. Enfin, nous ouvrons le chantier de la communication en relançant notre bulletin associatif à vocation régionale et en organisant un stage interrégional de formation à l'usage des réseaux sociaux où nous souhaitons être plus – et mieux – visibles.



Interviews Bertrand
et Hérouville

L'Assemblée générale d'Hérouville-Espéranto s'est tenue ce 14 janvier.

Après être revenus sur les événements qui ont marqué notre 40ème anniversaire, nous avons défini les grands axes de notre action pour l'année à venir.

Nous avons fixé le montant de la cotisation à 18,75 € pour la période janvier-septembre 2025.

À compter de cette date, nous rejoindrons le dispositif d'adhésion inter-associatif la cotisation conjointe à Hérouville-Espéranto et à Espéranto-France pour la période d'octobre 2025 à septembre 2026 sera de 65,00 € pour les personnes imposables et ouvrira droit à une réduction d'impôts, de 22,00 € pour les personnes non imposables. Un tarif spécifique est destiné aux adhérents de moins de 35 ans.

Cora Dion a été élue trésorière adjointe et Simon Roussigné devient le secrétaire adjoint de notre association.

♦ Pour adhérer, contactez Christian Marlier : riquier2@gmail.com - 07 86 28 99 85



Une galette et un verre
de cidre pour finir !



Inès en Okcitanio. (PRO -- PAT - 610)

Inès, kaboverda junulino, alvenas al Montpeliero, por studadi en la universitato sed misteraj kaj neatenditaj eventoj okazas.

Ĉu ŝi supervivos tragedion? Ĉu ŝi estos elpelita el Francio? Ĉu morto minacos ŝin? Ĉu amo kapablos protekti ŝin?

Tiu mallonga romano, verkita kaj ilustrita de Laure Patas d'Illiers celas legantojn, kiuj havas mezan Esperanto-nivelon (B1).



Stranga malapero. (KUR -- LIO - 612)

La rakonto okazas en Korsiko. Estas la fino de la lerneja jaro kaj la studentoj preparas sin por ludi la teatraĵon de Molière *L'Avare*. Sed neatenditaj aferoj okazas: stranga karaktero aperas kaj la patro de Carla kaj Enzo malaperas... Tiu facila legolibro celas la komencantojn (A1).



Belarta rikolto 2023. (PRO -- KOL - 611)

Ĉiujare aperas la Belarta Rikolto, kiu enhavas ĉiujn premiitajn verkojn de la Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio, poeziaĵojn, prozaĵojn, mikronovelojn, teatraĵojn, monologojn aŭ skeĉojn, eseojn kaj kantotekstojn. Jen la 2023-a eldono. Plejparte de la tekstoj celas legantojn, kiuj sufiĉe bone regas Esperaton (B1-B2).

Virtuala ekspozicio

Yan-Petro (Jean-Pierre Cavelan) estas provenca esperantisto. Li ilustris la rakonton *L'Arbre qui chante* (*La Kantanta Arbo*), tradukita al Esperanto kaj baldaŭ eldonita de nia klubo.

Li invitas ĉiujn al virtuala ekspozicio.

Malkovru la portretojn, kiujn li desegnis sekvante [tiun ligilon](#).

Per poŝtelefono oni fotadas kaj obtenas portretojn kaj memportretojn...

...Sed per simpla krajono kaj papero oni povas ankaŭ portreti, obtenante bildojn ne ĉiam neinteresantajn...

La bildoj estas legeblaj sur poŝtelefono, sed ili ankaŭ taŭgas por pli grandaj ekranoj. Unua kvalito de bildo povas esti la kapableco pri ekigado de konversacio.



Movadaj diversajoj

SPEKTINDA FILMETO

Esperante Eŭropen : Mon voyage à la découverte de l'espéranto



Gabin Forcier estas 25-jaraĝa esperantisto el Nanto, aktivulo de JEFO kaj TEJO. Li eklernis Esperanton antaŭ 2 jaroj. Dum 6 monatoj, li petveture vojaĝis tra Eŭropo por renkonti esperantistojn kaj samtempe pliprofundigi siajn konojn pri la lingvo kaj la movado.

Dum lia vojaĝo, li travojaĝis 20 landojn, ĉeestis 5 eventojn kaj pasigis 85 noktojn ĉe Esperantistoj!

Per dokumentfilmo, kiun subtenis la regiono Normadio, li pruvas, ke Esperanto funkcias kiel internacia lingvo pere de kiu oni povas vojaĝi, interkompreniĝi kaj amuziĝi.

La filmo estas en Esperanto sed disponeblas subtekstoj en la franca!

 <https://bit.ly/Gabin-en-Esperantujo>

RETAJ KURSOJ

Estis planite, ke  Duolingo ne plu permesu lerni Esperanton pere de la franca. Tamen finfine alvenis bona navaĵo: uzi nian lingvon daŭre eblas. Kompreneble, ankaŭ oni povas rete lerni Esperanton pere de  I-Kurso,  Gerda Malaperis (A2-B1) kaj  Paŝoj al Plena Posedo aŭ aliĝi al la  kursoj de la londona klubo.

Sed preferu tamen la ĉeestantajn kursojn en nia klubo!



NOVA MONERO 5000 STELOJ EL PLATENO AĈETEBLA

Ĉu vi scias, ke la Stelo estas la mono de la Esperanto-komunumo?

La Aŭstria Monerfarejo baldaŭ disponebligos moneron kun nominala valoro de 5.000 Steloj. Nur 25 ekzempleroj estos pregitaj.

La purplatena monero pezos $\frac{1}{2}$ unkon (15,56 g). Bildflanke de la monero aperas la vizago de la nederlanda esperantistino  Julia Isbrücker. Ĝi koston 1.200 Eurojn.

Informoj: Walter Klag, Vieno esperanto@chello.at

KONGRESO

La kongreso de Esperanto-France okazos en Nanto, de la 7-a ĝis la 9-a de junio.

Pri la temo **vojaĝoj** estos proponite trovi **Jules Verne**, kiu estis aktiva subtenanto de Esperanto, kaj lerni pli pri la aventuroj de **Lucien Péraire**, kiu travojaĝis la mondon bicikle dum kvar jaroj danke al Esperanto kaj verkis la libron "*Tra la mondo per biciklo kaj per Esperanto*", kiu disponeblas en nia biblioteko (BIO -.- PER - 067).

 Ligilo al la retejo de la kongreso:  <https://kongreso2025.esperanto-france.org/>



Remplissez ce bulletin (recto verso) et envoyez-le avec votre règlement,

• par courriel à : kongreso2025@esperanto-france.org

• par courrier postal à :

Esperanto-France
4bis, rue de la Cerisaie
75004 Paris

Vous pouvez régler :

☐ par chèque : à l'ordre de Esperanto-France

☐ par virement bancaire :

IBAN : FR76 4255 9100 0008 0123 8025 668

BIC : CCOPFRPPXXX

☐ en ligne, depuis votre espace personnel

<https://esperanto-france.org/perso>

Aucune inscription ne sera acceptée sans règlement.

Nom

Prénom

Adresse

.....

Code postal Ville

Pays

Tél

Courriel

Date de naissance : / /
jour mois année

Options souhaitées

Je désire : ☐ participer aux cours pour débutants

☐ participer à l'atelier Esperanto niveau avancé

☐ passer l'examen FEL

Vos nom, prénom et adresse courriel seront publiés sur le site du congrès et dans le livret distribué aux congressistes. Si vous ne souhaitez pas qu'ils soient publiés, veuillez cocher les cases correspondantes :

☐ ne pas publier mes nom et prénom

☐ ne pas publier mon adresse courriel

BIENVENUE À NANTES

NANTES

NAONED

En 2025, le congrès national de l'espéranto en France aura lieu à **Nantes**, ville d'art et d'histoire, connue pour sa créativité et son offre culturelle :

le **château des Ducs de Bretagne**, les **musées**, les nombreux événements, comme **Le Voyage à Nantes**, **parcours touristique** mettant à l'honneur des **œuvres singulières**, **éphémères** ou **pérennes**.

Le voyage sera en effet le thème du congrès, en l'honneur du rôle joué, depuis toujours, dans la navigation et le commerce par cette ville, qui était aussi dite « **la Venise de l'Ouest** ».

Voyage aussi au centre des œuvres du Nantais **Jules Verne**, qui ont inspiré des créations originales comme les **Machines de l'île**, **l'Éléphant** et le **Carrousel des Mondes Marins**.

Le **congrès** aura lieu dans l'ancienne manufacture des tabacs de Nantes, lieu idéalement situé près de la gare pour se déplacer en tram, à vélo ou à pied.

Venez donc profiter des **nombreuses activités** prévues (conférences, visites, excursions, préparation aux examens, dédicaces de livres, concerts, repas...) et en même temps **voyager dans cette ville** qui offre un **excellent cadre de vie**, des **transports en commun efficaces**, des centaines d'**espaces verts** urbains, une **vie culturelle** riche... sans oublier les visites aux alentours !

LIEU DU CONGRÈS

La Manu

10 bis Boulevard de Stalingrad
44000 Nantes
France

Coordonnées GPS : 47.2193790, -1.5351890



esperanto
France

Toutes les informations sur <https://kongreso2025.esperanto-france.org>

Congrès de l'espéranto en France

du 7 au 9 juin 2025 à Nantes



photo : jib144/Wikimedia Commons

Nantes vous invite au voyage



photo : Benutzer:KMJ /Wikimedia Commons

Pré-congrès
le 6 juin
à Saint-Nazaire

Escal'Atlantic
Les chantiers navals



photo: gresillon.org

Post-congrès
du 9 au 13 juin
au château de Grésillon
avec découverte
des châteaux de la Loire

Pré-congrès à Saint-Nazaire

Une journée au bord de l'océan pour découvrir la grande histoire des paquebots transatlantiques (Escal'Atlantic) et le travail sur les chantiers navals. Voyage A/R de Nantes à Saint-Nazaire en train.

Visites guidées gratuites en espéranto

Excursion 1 (samedi et dimanche après-midi)

Nantes historique, cœur de ville : le château des Ducs de Bretagne, les vieilles rues, le Passage Pommeraye, les places Royale et Graslin... et, au détour des rues, des œuvres d'art contemporain.

Excursion 2 (samedi et dimanche après-midi)

Le passé négrier de Nantes et les Machines de l'île : les quais de la Loire, les hôtels particuliers de l'île Feydeau, le Mémorial de l'abolition de l'esclavage, les Machines de l'île.

Les excursions 1 et 2 se font à pied et ne conviennent pas aux personnes ayant des difficultés pour marcher.

Excursion 3 (lundi après-midi) Visite du musée Jules Verne

Apéritif des régions : samedi soir

Nous invitons chacun à apporter des spécialités salées et/ou sucrées de sa région, à faire découvrir à tous.

Déjeuner dimanche

Voyage gustatif en Grèce et Turquie : 25 €

Logement et restauration

Le congrès a lieu dans le quartier de la gare qui regorge d'hôtels et de restaurants de toutes catégories.

Examens

Session d'examens de l'Institut Français d'Espéranto (IFEI) 1^{er} et 2^e degrés. Prendre contact avec triole.renee@wanadoo.fr

Post-congrès à Grésillon

Grésillon, le château des espérantistes près d'Angers, vous invite à découvrir le patrimoine du Val de Loire du 9 au 13 juin. Trois jours en Anjou et en Touraine pour visiter les châteaux d'Azay-le-Rideau et Langeais, la ville d'Angers, les châteaux du Plessis-Bourré et de Montgeoffroy, avec hébergement à Grésillon.

Forfait tout compris : transport de Nantes à Grésillon, pension complète du dîner du lundi 9 juin au petit déjeuner du vendredi 13 juin, excursions : 400 à 500 € selon la formule hébergement.

Librairie

Tous les jours, ouverture du service de librairie d'Espéranto-France.

Toutes les informations sur <https://kongreso2025.esperanto-france.org>

Une semaine sur les bords de la Loire

De l'embouchure de la Loire à Saint-Nazaire, puis 3 jours d'escalade à Nantes pour le congrès. Et remontée du fleuve royal et ses célèbres châteaux pour mouiller l'ancre au château espérantiste de Grésillon.

vendredi 6 juin : pré-congrès • Visite de Saint-Nazaire

Départ de Nantes à 8 h en train • Visite d'Escal'Atlantic le musée des paquebots • Déjeuner au restaurant • Visite des chantiers navals en bus • Retour en train à Nantes à 18 h 45.

samedi 7 juin

Matin : Accueil à partir de 8 h 30 • Cours pour débutants et atelier d'espéranto niveau avancé • Conférence sur l'histoire de Nantes • Réunion EDE (Europe Démocratique Espéranto) • Ouverture du congrès suivie d'un vin d'honneur

Repas libre

Après-midi : Conférence sur Jules Verne • Excursions 1 et 2 • Atelier chant avec Kajto • Conseil d'administration Espéranto-France

Soir : Apéritif des régions avec les spécialités apportées par les congressistes • Dîner libre • Soirée chants du monde avec Abeloj, bal folk et danses bretonnes

dimanche 8 juin

Matin : Atelier yoga du rire • Information sur les examens FEI • Rassemblement œcuménique • Assemblée générale d'Espéranto-France

Déjeuner : voyage gustatif en Grèce et Turquie

Après-midi : Présentation du livre *La Libro de la Mil kaj unu Noktoj* • Excursions 1 et 2 • Cours pour débutants • Conseil d'administration Espéranto-France

Soir : Dîner libre puis concert de Kajto

lundi 9 juin

Matin : Atelier d'origami • Cours pour débutants et atelier d'espéranto niveau avancé • Examens FEI • Conférence sur Lucien Péraire, *L'Eurasie à vélo - 1928 - 1932*

Repas libre

Après-midi : Conférence *Tanzanie : histoire d'une rencontre* • Visite du musée Jules Verne

17h30 : départ en bus pour le séjour à Grésillon

Repas et soirée libres

du lundi 9 juin (soir) au vendredi 13 juin : post-congrès

Séjour au château de Grésillon avec visite de la ville d'Angers et des châteaux de la Loire en Anjou (Montgeoffroy et Plessis-Bourré) et en Touraine (Azay-le-Rideau et Langeais).

La cotisation comprend le droit d'entrée, une participation au coût de la location des salles, tous les événements culturels (conférences, concerts, etc.), toutes les réunions et excursions à Nantes.

- 30 € pour les 30 ans et plus, membres d'Espéranto-France ou résidant à l'étranger
- 40 € pour les 30 ans et plus, non-membres d'Espéranto-France
- 15 € pour 16-29 ans, les étudiants, les chômeurs
- gratuit pour les moins de 16 ans
- majoration de 10 € pour les inscriptions après le 1^{er} mai

Inscrivez dans la dernière colonne les options choisies (y compris les visites gratuites) et calculez le total.

Cotisation (0 € - 15 € - 30 € - 40 €)		
Majoration pour inscription après le 1 ^{er} mai	10 €	
Déjeuner dimanche : spécialités grecques et turques (Boissons non comprises)	25 €	
Déjeuner dimanche- idem avec option végétarienne	25 €	
Excursion 1 : samedi	gratuit	☐
Excursion 1 : dimanche	gratuit	☐
Excursion 2 : samedi	gratuit	☐
Excursion 2 : dimanche	gratuit	☐
Excursion 3 : lundi	gratuit	☐
Pré-congrès à Saint-Nazaire	65 €	
Post-congrès à Grésillon :		
Nuitées en chambre plusieurs pers. ⁽¹⁾	400 €	
Nuitées en chambre 2 pers. ⁽¹⁾	450 €	
Nuitées en chambre individuelle	500 €	
Don		
TOTAL		

⁽¹⁾ Si nécessaire, veuillez indiquer ci-après le ou les noms des personnes avec qui vous souhaitez partager la chambre :

.....



La **Plurlingva Kafejo** en Hérouville Saint-Clair estas amika kaj interkultura evento. Malkovru multajn lingvojn. Estas parolataj la hispana, la angla, la germana, la ĉina, la itala, la finna, la pola, la rusa, la araba... kaj Esperanto. Merkredon, **la 12-an de Marto je la 7-a vespere en Café des Images, Esperanto estos la fokusita lingvo.**

📍 48 avenue de la Grande Cavée, Hérouville-Saint-Clair

Dessin : Robin Guinin, www.facebook.com/LE.ROBINOSCOPE/



Rejoignez-nous !

Nos **cours** se déroulent **tous les mardis** (hors vacances scolaires) de 17 heures 30 à 19 heures 00 à la Maison des Associations.

📍 10.18 Le Grand Parc à Hérouville Saint-Clair

Si vous ne pouvez pas nous rejoindre, vous pouvez participer au **cours en ligne gratuit I-Kurso**.
Le cours se compose de **10 leçons** à suivre à votre rythme.

Renseignements: esperanto.herouville.14200@gmail.com



ALIĜILO - Aniĝu al nia klubon... [🔗 bit.ly/HE-Kotizo-2025](https://bit.ly/HE-Kotizo-2025)

Nomo k. propra nomo :

Adreso :@.....

Retpoŝtadreso :

Telefononumero :

Mi fariĝas membro de Hérouville-Espéranto por la periodo de la 1-a de Januaro ĝis la 30-a de Septembro 2025.

Mi pagas 18,75 €.



Per bankokarto ĉe la retejo de Hello-Asso, alklaku tiun-ĉi ligilon: [🔗 bit.ly/HE-Kotizo-2025](https://bit.ly/HE-Kotizo-2025)



Per ĉeko je la nomo de Hérouville-Espéranto,
kiun mi sendas al Christian Marlier, 11 rue des Frères Colin - 14000 Caen